

Mia stelo - delikaĵo de la holokaŭsta literaturo en Esperanto

Kiu en la 1920aj jaroj naskiĝis kiel judo en Pollando, spertis verŝajne relative senzorgan kaj feliĉan junageon, sed post 1933 riskis travivi la inferon – kaj perdi sian propran vivon. Tiun sperton vole nevole faris ankaŭ Felicja Raszkin-Nowak, naskita la 23an de decembro 1924 en Varsovio, kiu rakontas sian tragikan vivhistorion en la libro *Mia stelo*. Al la ideo noti siajn rememorojn ŝi venis en 1989, kvindek jarojn post la eksplodo de la 2a mondmilito. Al ĉi tiu decido konvinkis ŝin pensoj pri la jaro 1968, kiam en ŝia pola patrujo denove ekflamis ondo de antisemitismo, kaŭzanta amasan forveturon de judoj, kiuj estis savitaj dummilite. Fine de 1971 ŝia familio forlasis Pollandon kaj iris al Kopenhago, Danlando, kie la vivo devis esti rekomencita.

La libro fariĝis 17-ĉapitra emociiga rakontaro, kiu komenciĝas per la infanaj jaroj de la aŭtorino kaj kiu finiĝas per epilogo kaj kompletigo. En la 30aj jaroj Felicja Raszkin vigle frekventis la lernejon. En la lernejo ŝi interesiĝis antaŭ ĉio pri historio, volonte ŝi skribis taskojn en la pola lingvo, allogis ŝin geografio kaj la matematikon ŝi ne satis. Felicja Raszkin sukcesis aliĝi al la gimnazio, kvankam tio kostis al ŝiaj gepatroj multe da mono. La 12an de majo 1935, ĉe la stratoj vidiĝis naciaj flagoj, mallevitaj ĝis la duono de la mastoj, kaj sur ili flirtis longaj, nigraj rubandoj. La homoj portadis funebrajn bendojn sur la brakoj. Tio signifis, ke forpasis la pola Gvidanto Józef Piłsudski. Erao en Pollando finiĝis. La mondo de Raszkin estis ankoraŭ malgranda, tiel ke ŝia vivo turniĝis preskaŭ nur ĉirkaŭ diligenta lernado. Same kiel en la popollernejo ĉiuj lecionoj estis en la pola lingvo. Inter la fakoj troviĝis la religio kaj la historio de la judoj. Deviga fremdlingvo estis la germana, kaj post la lecionoj eblis kromlerni la hebrean kaj la anglan, sen notoj en la diplomo. Sabate ŝi ne vizitis la gimnazion.

1933 kaj la sekvoj

Post 1933, kiam Adolf Hitler akaparis la povon en Germanio, la etoso malsereniĝis ankaŭ en Pollando. Kio sekvis, estis neimagebla kaj apenaŭ kredebla. Vespere la patro de Raszkin legis ‘Mein Kampf’ kaj kun ĉagreno konsideris la aktualajn politikajn eventojn en la mondo. Tio tre maltrankviligis la gepatrojn, kiel la aŭtorino memoras. Ili ĝuste antaŭsentis la militan tragedion, kiu baldaŭ atingos ankaŭ Pollandon.

Do, la bela epoko finiĝis subite la 1an de septembro 1939, kiam la armeoj de la nacisocialistoj enpenetris Pollandon por konkeri ĝin kaj persekuti la popolojn tie vivantajn, antaŭ ĉio la judojn.

Post la bombado de Varsovio Felicja Raszkin fuĝis en orienta direkto, al Bjalistoko, kiu estis ŝia dua familia urbo, kie vivis la avinjo kaj multaj parencoj kaj kie restis la paĉjo. Por kuniĝi kun ili necesis transiri la riveron Bug, kiu samtempe formis la limon kun Sovetunio, ĉar la oriento de Pollando estis okupita jam de la sovetia armeo.

En Bjalistoko

En sekvaj ĉapitroj Felicja Raszkin priskribis la etoson en Bjalistoko sub la sovetia kaj poste sub la germana regadoj. Kiaj teruraj tempoj! La novaj mastoj detruis ĉion antaŭan kaj trudis sian propran politikan sistemon. Ni ĉerpu iom el la teksto.

“Ni estis ĉe la sovetia flanko. Ni ekiris tra la urbeto. Ĉi tie estis multe da fuĝintoj, kiuj staris sur la placo kaj interparolis pri siaj travivaĵoj dum la germana regado. Ili fiksitis kun la koĉeroj la veturprezon, planis ion por la estonteco. Tranokto kun kusenego donis kvietan dormon post la elĉerpa longa vojaĝo. Matene mi rigardis marŝantajn rusajn soldatojn, kiuj ankaŭ estis invadintoj en nia patrolando. Vestitaj per longaj manteloj sen orlita rando, ilia cindrobruna koloro fandiĝis kun grizo de la pavimo. Sur la kapoj ili havis ĉapojn kun pinto meze kaj kun pendantaj ŝirmiloj, kiuj balanciĝis kiel azenaj oreloj. Multaj vizaĝoj estis kun mongolaj okuloj, iom plataj nazoj kaj larĝaj vangostoj. Unuafoje ni vidis tiajn homojn. Ili ne havis epoletojn kun rangoj, kaj nur malgrandajn triangulojn sur la kolumnoj kaj estis malfacile je la unua vido distingi oficiron de soldato. Ili ne similis polajn kaj

germanajn militistojn. Ĉiuj ĉi junuloj rigardis serioze kaj eĉ kiam ili kantis, ili ne ridetis. La komunajn kantojn interrompis lirikaj voĉoj de solistoj.”

“Interesis nin la situacio en Bjalistoko. Post mallonga ripozo ni devos aliĝi al la nova vivo-ritmo. La urbo estis ŝtopita de fuĝintoj, ĉefe judoj, kiuj timis persekutadon en Polujo okupita de hitleranoj. Ili serĉegis ian savon por si. Plej multajn oni lokis en la malnova sinagogo. Ili nestiĝis en primitivaj kondiĉoj kaj granda mizero. (...) La paĉjo komencis laboron kiel librotenisto (...). La panjo havis malgrandajn ŝancojn por labori en la profesio de kosmetikistino. (...) Ŝanĝiĝis la etoso kaj la kondiĉoj. Ĉio griziĝis. Neniu pimpigis sin, krom rusinoj – oficiraj edzinoj (...) La lernejoj estis malfermitaj, sed reformitaj laŭ la sovetia dekjara instruprogramo. (...) La instruado estis okazanta en la pola lingvo, sed aldoniĝis du novaj lingvoj – la rusa kaj belorusa, kaj ankaŭ la germana kiel fremdlingvo. (...) Pri ĉiu lernejo zorgis rusa milita trupo. Do, ofte vizitis nin oficiroj kaj ili aŭdigis sian prelegetojn, kaj grupoj de talentaj lernantoj estis invitataj al prezentadoj antaŭ soldatoj. Ni devis partopreni ĉiam pli longajn solenaĵojn en diversaj festotagoj kaj atendi nian vicon. Sed estis bona publiko. La rusaj soldatoj akceptadis nin kore kaj dankeme aplaŭdis. Ili regalis nin en sia kantino, donis al ni dolĉaĵojn. La provizado de la vendejoj estis modesta, ĉiam mankis io, sed laŭ sovetia kutimo oni aranĝis specialajn liverojn okaze de la ŝtataj festoj. Do, ni omaĝis la 1an de Majo kaj la Oktobran Revolucion ne nur per ruĝaj flagoj, sed ankaŭ per mandarinoj, halvo kaj bombonoj. (...).

Sekvis ankaŭ gravaj ŝanĝoj en la familia vivo. La domon de ŝia avinjo oni ŝtatigis. Do, oni devis forlasi la loĝejon, kaj la tutan frontparton okupis sovetiaj militistoj. En la alo oni restigis onklinjon Annan kaj oĉjon Jakobon Ŝapiro, la esperantiston, sed ilia sorto ne estis certa. La poresperanta agado de la oĉjo devis esti prokrastita. La internacian lingvon bezonis neniu, la eksterlandaj kontaktoj iĝis suspektindaj, Raszkin lamentis.

Germana-sovetia milito

Kiam en 1941 la germanoj atakis Sovetunion, la aviadiloj ĵetis ankaŭ bruligajn bombojn super Bjalistoko. Felicja Raszkin denove disfuĝis, piede centojn da kilometroj sencele tra la ĉirkaŭa regiono, por serĉi protekton ĉe fremdaj homoj: “Ĉie la homoj estis same konsternitaj pri la milito. Ili ne povis kompreni, ke Germanio atakis Sovetion, malgraŭ la subskribita pakto pri neagresado“, Raszkin notis.

“Ni devis nin gardi ne nur antaŭ la germanaj soldatoj, sed ankaŭ por ne fidi vilaĝanojn. Serĉante vespere tranoktejon, ne ĉiam ni estis akceptataj kun la sama koreco. Okazis, ke oni rifuzis al ni helpon, parolante ke certe ni estas judinoj. Anstataŭ neadi, ni plu marŝis.”

Kiam la sovetianoj fuĝis el Bjalistoko, la nova reĝimo sub la germanoj fariĝis multe pli kruela, ĉar la germanoj celis la forpelson kaj murdon de la judoj. La unuaj bomboj, falantaj sur Bjalistokon, malbridis panikon, same kiel en Grodno. La sovetia militistaro kaj civiluloj laborantaj en diversaj rusaj oficejoj, tute surprizitaj per la militeksplodo, forlasis la urbon tumulte. Ili provis fuĝi per vagonaroj, kamionoj kun soldatoj aŭ per siaj veturiloj. La germanoj mitraladis la vojojn kaj multaj estis pafitaj tuj en la komenco de la fuĝo. Raszkin informiĝis pri la fama kruelega krimigo de la germanoj, kiuj la 27an de junio enfermis preskaŭ 800 homojn en sinagogo kaj bruligis ĝin: “La vidintoj longe aŭdis terurajn kriojn de la viktimoj, kaj post la sinagogo restis cindro kaj brulnigraj ostoj. La tuta kvartalo estis detruita, kaj en la pogromo oni murdis ĉirkaŭ 2000 judojn.”

Vivaĉo en la getto

La 2an de aŭgusto 1941 oni fermis la pordegojn de la getto. Raszkin: “Malantaŭ la pordegoj estis alia mondo. Niaj stratoj pli malriĉaj, niaj loĝejoj pli mallumaj, homoj malsataj. Oni senigis niajn okulojn je la tuta verdaĵo de la parkoj kaj herbobedoj, kaj niajn orelojn – je ĉiuj sonoj de la kantantaj birdoj. Ni perdis aspekton de la normalaj homoj, kiuj iras sur la trotuaroj. Eĉ la ĉielo perdis sian bluan, ĉar la kapoj ne leviĝis, sed klinis sin al la griza pavimo. La laboro ekster la getto fariĝis plej valora, ĝi donis kontakton kun la urbo-vivo pulsanta ĉirkaŭe. Ne plu grava estis loko, nek laboro tie, nur elgliti el tiu ĉi malliberejo! Pro mia laboro ekster la getto mi havis fenestreton al la granda mondo.“ Dume, la patro de Felicja Raszkin estis deportita, kune kun Jakobo Ŝapiro, la esperantisto. Malgraŭ la granda malamo, kiu ekregis en Bjalistoko, Felicja, ne ankoraŭ 20-jara, spertis sian unuan amon – Stefano. Raszkin sincere priskribis siajn sentojn kaj emociojn por li. Sed poste li perdiĝis.

La malfacila kaj naŭza vivado en la bjalistoka getto, en kiu Felicja Nowak pasigis sian plej malfeliĉan vivotempon, estas skizita tra pluraj ĉapitroj. Ŝi mem trovis laboron aŭ en teksejo aŭ en tabakfabriko. Temis pri vivo kun mortverdikto. Regis la fatalismo laŭ jena filozofio:

“– Iel ni saviĝos, la germanoj devas ja malvenki – ni diradis.

– Ili malvenkos, sed ĉu ni ĝisvivos – suspiradis Tolĉsjo.”

Ĉi tiuj germanoj kondukis kiel furioj kaj bestioj en la getto. Ili malhelpis, ĉikanis, sufokis, persekutis, turmentis kaj punis la judojn ĉie kie eblis. Ili pendigis homojn ĉe la galgo, detruis la getton, sendis pli kaj pli da viktimoj al koncentrejoj kaj neniigejoj kiel Treblinko kaj Aŭŝvico. Por la judoj necesis pripensi kiel savi sin mem. “La aliaj diradis, ke la germanoj kondamnis nin al morto, kaj estas nur la afero de la tempo, kiam ili efektivigos la verdikton. Neniu povis forgesi la tragedion, sed eĉ la pesimistoj aŭskultis vortojn de la espero. Mia panjo kredis je la savo kaj ne volis pensi, ke oni plilongigis al ni la vivon nur por kelka tempo.”

Raszkin raportis, ke en 1943 la ribelo en la varsovia getto estis sufokita, aliflanke la batalo de Stalingrad estis malvenkita por la germanoj, kiuj fariĝis pli kaj pli nervozaj. La krakova getto estis likvidita, kaj en Bjalistoko prepariĝis la translokado de la judoj al Lublino. Feliĉe, Felicja povis eskapi la selektadon.

“La getto prezentiĝis terure. Kadavroj en sango, vunditoj sen helpo. Detruitaj loĝejoj, disŝetitaj mebloj kaj vestoj, rompita fenestrovitroj kaj vitropecoj disfalantaj sub la piedoj. Elrompitaĵoj pordoj de la malplenaj domoj. Ĉie ŝvebanta plumaro el disfenditaj kusenegoj. Sufoka brulodoro.”

Felicja Nowak havintus la opcion fuĝi el la getto, sed trifoje ŝi revenis, ĉar en la getto loĝis parencoj, inter la plej proksimaj ŝiaj avino kaj patrino, de kiuj disiĝi ŝi ne povis kaj ne volis. Felicja renkontis polajn vilaĝanojn, konatojn de ŝia familio, kiuj helpis per nutraĵoj, sed poste ŝi perdis la kontakton kun ili. Post la morto de la avino ŝi sentis sin treege korigita kun sia patrino, kaj ŝi devis trovi respondon al la demando ĉu fuĝi aŭ resti. Finfine ŝi decidis forlasi la getton, por savi sin mem.

Ekzistado en la kaŝejo

Vestita kiel pola knabino kun la nomo Valdemara Budz kaj kun falsa vivrakonto Felicja atingis la vilaĝon, kie loĝis la pola sinjoro Petro, kiu pretis kaŝi ŝin en la subtegmentejo de sia domo ĝis la fino de la milito. Por ne esti malkovrita, Felicja apenaŭ povis moviĝi, brui aŭ montri sin. Oni nutris ŝin trifoje tage kaj donis al ŝi iujn okupojn. Fakte, ne ĉiuj loĝantoj de la vilaĝo kompatis la judojn, kaj al neniu alia krom al sinjoro Petro eblis vere fidi. Felicja vivis de tago al tago, fizikajn fortojn ŝi bezonis por subteni sian psikan farton. Ŝi devis batali kun la tempo kaj necesa estis ia okupo por la manoj kaj menso: “Ĉiu okupo en mia solejo estis kvazaŭ savo. Mi kudradis, flikadis, trikadis. Mi legadis ĉion, kion oni alportis por mi. Mi ricevis salutojn de Maria, kiu sendis al mi germanajn librojn. Ne estis facile por mi forgesi la realon, sed legado mildigis ĉe mi zorgojn.”

La vintro estis frosta kaj kvazaŭ senfina. Ne ĉiam ŝi povis dormi. Jam ĉirkaŭ la tria horo posttagmeze griziĝis kaj 18 horojn ŝi kuŝadis en la mallumo. Dum la silvestra vespero, malgraŭ la frosto, ŝi restis en la kaŝejo. Estis la kutimo viziti unu la alian kaj bondeziri, trinki bimbiron kaj amuziĝi laŭ tradicia maniero. Ĝis malfrua nokto Felicja aŭdis gajajn voĉojn.

La 27an de julio 1944 Bjalistoko liberiĝis de la germanoj kaj la sovetiaj trupoj okupis ĝin. Ŝiaj ‘gastigantoj’ timis tro frue malkaŝi ŝin kaj diskonigi sian rolon pri la saviĝo de la judino. Dume, Felicja daŭre sidadis en la subtegmentejo, kvankam ŝi havis la ardan deziron kuri al la urbo por ekscii, kio okazis kaj kiu de ŝiaj familianoj kaj konatoj estis savitaj. Kiam ŝajnis sendanĝere, Felicja finfine forkuris de la vilaĝo en la urbon, kie ŝi eksciis multajn terurajn novaĵojn. Inter alie, ke la 12an de julio 1941 estis mortpafita sur Petrasze ŝia patro, kune kun oĉjo Jakobo Ŝapiro, la esperantisto. El la tuta granda familio restis nur ŝi. Ŝi ankaŭ ricevis la sciigon, ke naciista bando intertempe atakis la bieneton de sinjoro Petro, kiu estis kruele punbatita. Oni rabis iliajn ĉevalojn kaj bovinojn, traserĉis la kabanon, forprenis pelton, botojn kaj ŝtelis aliajn objektojn. Sed la gemastrojn en la vilaĝo trafis ankaŭ alia sorto. Post la akuzo pro la kunlaboro kun la Landa Armeo dum la milito sinjoro Petro estis arestita kaj ĉe ili komenciĝis observado.

Post la liberiĝo – trista vivo en la komunismo

Felicja dume forveturis al Moskvo, kie vivis iu onklo kun sia familio. Dum la preskaŭ dujara restado en Moskvo ŝi daŭrigis lernadi por plikleriĝi, kio fariĝis ŝia ĉefokupo. En majo 1946 ŝi edziniĝis al iu Jaĉjo Raszkin, kiu estis oficiro de la Pola Armeo. Samtempe ŝi revis reveni al la patrujo, kio efektiviĝis en julio, kiam ŝi forlasis Moskvon. En 1949 ŝi komencis en Poznano vizitadi la dujaran artistan lernejon. La diplomo rajtigis ŝin reŝisoradi en amatoraj teatrotrupoj.

Sed ne venis esence pli bonaj tempoj. La vivo sub la komunisma regado evidentiĝis malfacila: “Kreskis la diferenco inter la oficialaj opinioj kaj la propraj pensoj. Estis pli kaj pli grandaj duboj. La malnova kredo, ke estos starigita la ordo kun socia justeco, disbloviĝis. Tamen restis iu naiva espero. Ni eniris la periodon de ‘malgranda stabiliĝo’. Estis ŝatata laboro kaj agrabla medio, aro da geamikoj, familia angulo, ĝojo pri infanoj kaj penso, ke eble ili vivos pli bone.”

Unua streĉiteco aperis en la jaro 1956, kiam en Poznano eksplodis strikoj, kiuj estis brutale disbatitaj kaj en kiuj pereis homoj. Kun teruro Raszkin aŭskultis la vortojn de la ĉefministro Cyrankiewicz: “Kiu levos la manon kontraŭ la popolregantoj, al tiu la popolregantoj dehakos la manon.” Varmege Raszkin subtenis la liberigajn ideojn en Hungario; la invado de sovetiaj tankoj en Budapeŝton por ŝi estis despli granda ŝoko. Sed la degelo daŭris mallonge kaj denove ekblovis frida politika vento ĝis nova malagrabla frostado. Denove la cenzuro forstrekis tekstojn kaj forstranĉis el la bendo preparitajn radio-elsendojn.

En 1967, la okazaĵoj en Proksima Oriento, la milito inter Israelo kaj la arabaj najbaroj subite ŝanĝis ĉion. La vorto ‘cionisto’ fariĝis sinonimo de la vorto ‘judo’. En la radio la muziko de Arthur Rubinstein malpermesigis, same kiel en la teatro la dramo *Dziady* de Mickiewicz. La junularo protestis. En 1968 okazis la ‘Praga Printempo’. Estis uzata la nova difino pri la “polarigo de la socio”. Raszkin memoris: “Kune kun la malboniĝanta ekonomio de la lando kaj senĉesa manko de de plej diversaj varoj sur la merkato en Polujo kreskis la malŝato por la ‘Granda Frato’ kaj ni ĝojis pri tiu fiasko de la sovetia politiko.” Gomulka kaj Moczar verŝis oleon en la fajron. La aŭtoritata komunista ŝtatestro konsideris la judojn kiel ‘kvinan kolonon’ kaj komprenigis al ili malkaŝe, ke Polujo sen bedaŭro adiaŭos al tiu ĉi parto de sia civitanaro. Sekvis nova ondo de diskriminacio de la judoj; kiel Raszkin raportis, dum kunvenoj en la uzinoj oni akuzadis, kalumniadis kaj eliminis juddevenajn laboristojn el la partio, studentoj estis forpelitaj el la universitatoj, kaj multajn aliajn oni eĉ arestis aŭ senigis de la studrajto. Amase oni maldungis homojn, judaj kooperativoj estis likviditaj, en la armeo okazis purigadoj, kaj oni komencis esplori la devenon de homoj. La poloj konkludis, ke la tuta ideologio pri la supereco de la socialismo, trompe konstruata dum jaroj, fiaskis kaj turniĝis kontraŭ la judoj, kiuj devis esti kulpaj pro ĉio.

Penso pri elmigro

Alvenis la momento, kiam la familio de Felicja Raszkin-Nowak komencis pensi pri foriro el Pollando. Al la edzo ne estis facile akcepti la penson pri elmigro. Sed al la infanoj oni volis evitigi novajn antisemitismajn spertojn. Do, unue Mariano forveturis, duonjaron poste ankaŭ la filino. Antaŭ ol Felicja mem forlasis Pollandon, ŝi ankoraŭfoje vizitis Bjalistokon por adiaŭi al la muroj de la familia domo ĉe la strato Lipowa 33 kaj daŭrigis al Lublino kaj Majdanek, kie plej verŝajne pereis la patrino. Post hontinde ĉikana esplorado de siaj havaĵoj far la polaj doganistoj kaj sen mono en la poŝo oni finfine permesis al ŝi forveturi. Estis malpermesite kunpreni legitimilon, kiu povus montri dungolokon, sindikaton aŭ asocion. La edzo estis konsiderata kiel portanto de ŝtataj sekretoj. “Oni faris ĉion, por ke niaj lastaj rememoroj estu kiel eble plej malbonaj,” Raszkin plendis seniluziigita. La 15an de novembro 1971 Felicja Raszkin-Nowak kaj ŝia edzo forlasis Pollandon por ĉiam por rekomenci la vivon en alia lando.

Profundaj impresoj

Leginte antaŭ kelkaj jaroj la libron *Mia stelo* en la germana lingvo, mi estis malofte kiel en tiu ĉi kazo ravita kaj profunde impresita. Estas do tre ĝojige, ke ĉi tiu korŝira raporto haveblas nun ankaŭ en sufiĉe bona Esperanto-eldono. Felicja Raszkin-Nowak ne nur rakontis pri si mem, sed liveris ankaŭ multajn informojn pri parencoj, amikoj kaj konatoj, kiuj iel rilatis al ŝia familio. Tiu larĝigo de la

atento al sennombraj aliaj personoj faras la memuaron despli bunta kaj interesa. Ankaŭ ne mankas multaj koncizaj indikoj pri aktualaj eventoj, kiuj riĉigas la biografion kaj estas utilaj por kompreni la historian kuntekston. Malgraŭ kelkaj pridisputeblaj lingvaj kazoj, kiuj koncernas ĉefe participojn, akuzativon, objektojn, afiksojn kaj artikolon – Tomasz Chmielik (teksto) kaj Lidia Ligeza (versaĵoj) trovis vere originalan esperantigan solvon, kiu konsistas inter alie en la redono de diversaj tipaj nomoj polaj, judaj, rusaj, belorusaj – homoj nomiĝas Anna Grinberg, Fanny Kahan, Osip Tropp, Njuŝa Breitŝtok, Izĉjo Zbar, Mira Kvasovicer, Mura Szacka, Anjo Hildebrand, Lusinjo Tilleman, Riĉjo Levi, Luĉjo Dojlidzki, Manjo Jeleniewicz, Ester Raĥela Kamnińska, Fimo Meisler, Tomasz Libiszowski, Barbara Krafft, Izĉjo Weintraub, por menciĝi nur kelkajn. Nacilingvaj nomoj kiel Judenrat, Gestapo, Gestapanoj, SS, Gauleiter, Führerin estis aŭtentike konservitaj. Estas enkondukitaj neologismoj kiel galgo (pendumilo), ŝmugli (kontrabandi), palto (mantelo), holandi (sketi kun balancigado kaj turnigado de la korpo). La tradukintoj do maksimume eluzis la leksikan kaj vortfaradan potencialon de Esperanto – kaj tio estas alloga kaj laŭdinda.

Ne plej laste, grava kaj interesa momento por la historio de Esperanto la libro de Felicja Raszkin-Nowak estas pro tio, ke ĝi rolas ankaŭ kiel omaĝo de samtempa atestantino al la famekonata esperantisto Jakobo Ŝapiro (Szapiro) el Bjalistoko, kiu estis ŝia onklo. Ŝapiro estis la antaŭmilita gvidanto de la Esperanto-movado en la naskiĝurbo de L.L. Zamenhof. Kiel judo li fariĝis viktimo de la naci-socialisma holokaŭsto kaj estis murdita de la faŝistoj en julio 1941 en Bjalistoko. Kvankam Felicja Raszkin ne scipovis Esperanton, en la koro ŝi certe kapablis kompreni la signifon de la esperantismo laŭ la maniero praktikata de Ŝapiro, ankaŭ pro tio, ke ŝi rilatis tre senteme al lingvaj kaj etnaj demandoj kaj entute pozitive konsideris la Esperanto-laboron de sia tre originala onklo.

En surpriza postparolo, la fama pola verkisto Andrzej Szczypiorski (1924-2000) sincere laŭdis la rakonton de Felicja Raszkin-Nowak, kiun li konsideris kiel unu el la plej interesaj libroj pri la pereco de judoj kaj pri la rilatoj inter poloj kaj judoj. Li pensis, ke la aŭtorino sukcesis diri tre multe laŭ kredinda maniero sen troigita sentemo, kvankam sentimentalaj tonoj neeviteble aŭdiĝas kelkloke. Laŭ li tio estas akceptinda, se oni konsideras, ke la aŭtorino staris rande de la infero kaj pereco. Szczypiorski konkludis, ke “la rakonto-maniero de Felicja Nowak estas atentokapta, oni legas ĉi rememorojn ne nur kun dolorsento, ne nur kun kompatemo kaj espero, sed ankaŭ – kion mi opinias plej grava – kun granda intereso.”

Andreas Künzli

Mia stelo. *Felicja Raszkin-Nowak.* Tradukis T. Chmielik, L. Ligeza. Książnica Podlaska im. Łukasza Gónickiego. Białystok. 2011. 189 paĝoj. Prezo: 15.60 € (UEA)